


abril 2006

QUANCO

2/06

APRILIO-JUNIO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



**Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio**
(2/2006, aprilo-junio)
Aperas 4-foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfolio 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonaĵoj: +53(7)40 4484
Fakso: 643 8729
Retadreso:
avanco@esperanto.co.cu

Ĉefredaktoro:
NORBERTO DÍAZ GUEVARA
norberto@ssp.desoff.cu

Revizias kaj kontrolas:
JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO
ALBERTO F. CALIENES
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ
JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

Enpaĝigo:
ALBERTO F. CALIENES

Reproduktado permesata
Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

Dum maja semajnfino, dudeko da esperantistoj partoprenis en Havano la Seminarion pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko SAEST 2006. Pri prelegoj kaj multaj aliaj detaloj, samkiel pri kritika trarigardo vi povas legi sur apuda paĝo. Pri utiligo de Esperanto kaj konkrete pri la sciencteknika agado ni volonte publikigos viajn opiniojn. Foto: Norberto Guevara.

estimata leganto

En la lasta trimonata periodo elstaris la Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST 2006), pri kiu vi povos legi en tiu ĉi numero. Pliaj samperiodaj okazintaĵoj en diversaj regionoj de la lando trovas lokon en la sekvaj paĝoj.

Al tio ĉio aldoniĝas pluraj legindaĵoj, kiel "Plurjara povesperanta agado en Ameriko" (Juan Ramón Rodríguez); kaj "Pri la Esperanto-kulturo en Kubo" (Martín Castro).

Mi memorigas vin pri tio, ke ankaŭ viaj kontribuaj trovos spacon en la oficiala organo de nia Asocio, do, tio estas rekta invito al vi sendi kunlaboraĵojn.

Agrablan kaj nutritivan legadon! Kun Avancaj salutoj,

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

Ĉu vi jam pagis vian kotizon?

Aktivu por ke nia Asocio plifortiĝu!

Kaj ne forgesu: Ni mem estas Esperanto!

enhavo

SAEST 2006 NORBERTO DÍAZ GUEVARA	3
La movado en la lando (Novajaro)	4
KEA en la lastaj jaroj	7
Pri Esperanto-kulturo en Kubo MARTÍN CASTRO LÓPEZ	8
Plurjara povesperanta agado en Ameriko JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ	9

Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko SAEST 2006

Sampaĝe en *Avanco* 4/2005, eblis legi komenton pri la sciencteknika agado en Esperanto, kaj ankaŭ inviton al SAEST 2006, dum kiu la kubaj esperantistoj pruvos la aplikon de la lingvo en la teknika mondo.

La Seminario sesiis en la sidejo de KEA, en Havano, la 19an kaj 20an de majo, kun ĉeesto de dudeko da esperantistoj, inter kiuj du reprezentantoj el la filioj de la urboj Guantánamo kaj Sancti Spiritus.

Estis notinda la diverseco de la prelegaj temoj, multaj el kiuj estis tre interesaj kaj utilaj por la publiko: *Etiko kaj libereco, kialoj por labori cele al pli bona mondo* (Juan Lázaro Besada Toledo); *La lernociklo kaj la komunika kompetento* (Julián Hernández Angulo); *Sana nutrado* (Fráncel Briel); Ĉu estas reĝa vojo de la sudo, ŝoseo Jesús del Monte aŭ ŝoseo Diez de Octubre? (Albania Duthil Álvarez); *Korektigo de la elektrolinio al la vilaĝo La Gloria* (Jesús Velasco Torres); *Sanigaj plantoj* (Ljudmila Kaŝtanova); *Bezono disvastigi la Kuban kuirarton* (Cirilo Ramos Piñeiro); *Esperantaj supersignoj en la interreta teknologio* (Norberto Díaz Guevara); *Esperanto-tradukado: ĉu ilo en la servo de teknologio?* (Maritza Gutiérrez González); *Komunuma projekto: Esperanto en publika biblioteko* (Andrés Rodríguez González); *Alproksimiĝo al interlingvistiko* (Julián Hernández Angulo); *De referaĵo al artikolo* (Juan Ramón Rodríguez Gómez).

Avidaj demandoj pri diversaj punktoj de la prelegoj, kaj interesaj debatoj leviĝis el la publiko, kaj en ĉiu momento regis vigla etoso.

Sed nenio estas perfekta.

En la nuna seminario mankis reprezentantoj el multaj provincaj filioj, kaj tio lamiĝis la tutlandecon de la evento, kiu estis organizata de KEA spite al sidejaj kaj transportaj malfacilaĵoj.

Kelkaj detaloj plibonigindaj estas la ĉeesto de ĵurnalistoj, kiuj raportu pere de la amas-komunikiloj.

Kaj estus bone kolekti ĉiujn prelegojn kaj ilin publikigi en broŝuron, kiu ja riĉigos la sciencteknikan literaturon.

Ĉu estas utopio pensi, ke konigi al eksteruloj la titolojn de la prelegoj gravigos la lingvon?

Ĉu estas utopio pensi, ke almenaŭ unu el tiuj neesperantistoj povus interesiĝi pri temo, kaj ke ni povus disponigi la tekston de la prelego, ekzemple, en la hispana lingvo?

En la nuna tempo la informado estas gravega, kaj la ekzisto de gravaj kaj interesaj informoj en Esperanto, certe gravigos kaj seriozigos nian lingvon.

En la sciencteknika agado ni laboru en la direkto, ke Esperanto estu nepra fontolingvo, tiel ke serĉantoj trovu en ĝi la bezonatan temon aŭ respondon.

La tasko ne estas malfacila; necesas nur estontaj SAEST kaj diskonigon pri ili.

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

Noto de la redakcio:

Ni volonte aperigos viajn komentojn pri ĉi tiu kaj aliaj temoj rilate utiligon de Esperanto.

Loka grupo alte en Granma

La 27an de majo 2006 oficiale fondiĝis la unua loka grupo de Esperanto, kun dek membroj, en la montara municipo Buey Arriba, en la orienta regiono de la lando. La ĉeestantoj, inter kiuj troviĝis reprezentantoj de la provinca estraro, vizitis diversajn socikulturajn kaj historiajn lokojn, kiel la sportan hotelon, la librovendejon kaj la bibliotekon, la kulturdomon, kaj la dommuzeon "La Otilia", kie komandanto Che Guevara pasigis tempon de sia gerila vivo en la montaro Sierra Maestra. La promenado finiĝis per ĝuado de la klaraj akvoj de la rivero Buey (Bovo).

La oficiala aranĝo komenciĝis je la 5a pm en la municipa muzeo, kies salonoj veturigas la vizitanton tra diversaj periodoj de la municipa historio. Aŭdiĝis la nacia kaj esperanta himnoj, apud ambaŭ flagoj. Yoandris Pompa Valdespino, komisiito pri informado en la provinca estraro, kaj kunordiganto por la municipo Buey Arriba, faris la malferman paroladon, kaj poste Rafael Cabrera, prezidanto, parolis pri la historio de Esperanto en Buey Arriba, pri la relativa gramatika facileco de la lingvo, kaj pri la vortfarado; li rakontis anekdotojn okazintajn en diversaj renkontiĝoj kaj kongresoj kubaj kaj eksterlandaj, kaj li substrekis la rolon de la Asocio en la kreado de granda familio kaj la gravecon de la lingvoregado por la perkoresponda interŝanĝo kun aliaj esperantistoj.

Okazis ekspozicio de manfaritaĵoj de bajaranaj esperantistinoj, kaj prezentiĝis libroj, revuoj kaj aliaj dokumentoj en rilato kun Zamenhof. Poste elektiĝis la estraro de la

loka grupo: Alián González Chacón, prezidanto; Michel Valdespino Borrero, vicprezidanto; Adriannis Molina Alba, financo.

La membroj de la loka grupo interkonsentis dankeme gratuli la teamon de la radio-programo "Encuentro" (Renkontiĝo), kiu daŭre apogas la provincan asocion, kaj sendi al ĝi E-flagon. Tiu radioprogramo ebligas, ke Esperanto ĉiumarde aŭdiĝu en multaj lokoj, pere de la programaro "El Esperanto es un camino hacia la vida" (Esperanto estas vojo al la vivo).

Kune kun la natura beleco de la montaro, la renkontiĝon ĉeestis pluraj infanoj, kaj eĉ la pluvo ne volis resti for kaj ĝi venis iom mildigi la varmegon.

Esperanto estis semita en la montaroj, kaj ni fidas, ke kun la alveno de la printempo, ĝi kreskos kaj floros en tiu kampara regiono.

YOANDRIS POMPA VALDESPINO

Cienfuegos: renkontiĝo omaĝe al José Martí

La 13an de majo 2006, esperantistoj de la urbo Cienfuegos renkontiĝis okaze de la 111a datreveno de la forpaso de José Martí, la Kuba nacia apostolo.

La evento efektiviĝis en la provinca biblioteko Roberto García Valdés, en la faka salono pri José Martí. Kune kun pli ol deko da esperantistoj ĉeestis María Elena González (kultura promociantino de la biblioteko), Milagros Delgado (estrino de la salono pri José Martí, kaj membro de la estraro de la samnoma kultura societo en Cienfuegos), kaj Marcia Silva (jurnalisto de la provinca



Nacia renkontiĝo en Granma

De la 14a ĝis la 16a de aprilo okazis nacia renkontiĝo kun la temo "Esperanto en la 21a jarcento: nuntempo kaj estonteco", en la kampadejo "Los Cantiles" (La kantiloj), en la orienta kuba provinco Granma. Cantil (Kantil') estas marborda aŭ riverborda loko kie formiĝis ŝtupoj, kaj en Los Cantiles estas multaj ŝtupoj ambaŭflanke de la rivero.

La ĉeestantoj ĝuis la belecon de la urbo antaŭ ol translokiĝi al la kampadejo.

En la renkontiĝo partoprenis geesperantistoj el Ciudad de La Habana, Camagüey, Granma, Santiago de Cuba kaj Guantánamo, kaj estis ekspozicio pri fotoj, moneroj, Esperantaj libroj kaj manĝaritaĵoj.

Vendrede posttagmeze okazis promonado kaj sinbanado en la rivero, kiu estas tre bela kaj havas grandajn ŝtonojn kaj akvofalojn. En la arta vespero aktive partoprenis la bajamanoj, kaj la ceremoniestro Yoandris Pompa, tre lerte agis. La programaro komenciĝis per la infankoruso gvidata de Raciél Labaut, kiu prezentis kelkajn kanzonojn, inter kiuj "Bonvolu, donu al mi kison", verkita de nia kara Dubel Lachatagnerais. Tiu kanzono estis prezentita dum la kultura festivalo en Santiago de Cuba, en 1999.

radiostacio Radio Ciudad del Mar, kaj membro de la klubo de Esperanto).

Post la enkonduko farita de Marisol Delgado pri la sinteno de Martí rilate al la temoj amikeco, vero kaj virino, Bárbara Borrell (prezidantino de la E-Klubo), skize prezentis la historion de la movado en Cienfuegos. Norberto Díaz (KEA-estrarano pri informado), transdonis salutojn nome de la nacia estraro kaj prikomentis la bonkoran sintenon de Zamenhof, la celon kaj utiligon de Esperanto, kaj la aplikon de la lingvo en Kubo.

Li finis per gratuloj al la patrinoj de la klubo kaj de la biblioteko, okaze de la Patrino Tago.

Infanoj kaj plenkreskuloj Esperante kaj hispane legis versojn kaj frazojn de José Martí, kaj belaj infaninoj prezentis artaĵon pri La Hispana Dancistino, temo de la nacia heroo.

Kvankam la plej granda parto de la evento okazis en la hispana lingvo, la enhavo estis riĉa kaj altkvalita, kun granda kultura bazo, kaj elmontriĝis la funkciado de la movado.

Bárbara Borrell, Yoelvis Liaño kaj Galo Rodríguez (estraranoj de la klubo), lerte kaj profesie organizis la eventon kaj bone atentis pri ĉiuj detaloj.

NORBERTO DÍAZ GUEVARA



La reprezentantoj el la diversaj provincoj salutis la ĉeestantojn, kaj krome aŭdiĝis poemoj, humuraĵoj, proverboj kaj fine, en la lasta danco la publiko tre ĝoje partoprenis.

La programo de la sekvonta tago komenĉiĝis per prelego pri Yumeiho-terapio fare de Fráncel Briel, kiu praktike aplikis la kuracmetodon al ĉeestantoj; ĉiuj tre ŝatis la prezenton.

En la vespero okazis lotumado, partopreniga ludo gvidata de Marta Alonso, en kiu venkis la Guantanamo teamo; en la konkuro pri konataĵoj de elstaruloj en Esperantujo venkis Marta Alonso, kiu ricevis tre belan tapiŝon donacitan de la Guantanamoj, kiuj estis la organizantoj de tiu grava parto de la programero.

La tuta ĉeestantaro konsistis el sepdeko da homoj: kvar reprezentantoj de la nacia estraro; kvar geesperantistoj el Urbo Havano; tri el Cascorro, Camagüey; kvar el Santiago de Cuba; sep el Guantánamo; kaj la celeraj estis el Bajamo, Granma. La nacia estraro estis reprezentata de Marta Alonso, kaj ĉeestis ankaŭ Albania Duthil, Roberto Molina kaj Pedrito Fernández.

La evento havis tre agrablan etoson kaj ĉiuj kontentis, kun la espero, ke venontjare la provinca filio Granma faru similan eventon.

RAFAEL CABRERA kaj TIRSO ÁVILA
Foto: ROBERTO MOLINA GÁLVEZ

E-Klubo en UCI, la Universitato de Informadikaj Sciencoj

La 22an de aprilo, en la sidejo de Kuba Esperanto-Asocio en Havano, okazis renkontiĝo kadre de la semajno de la lingvoj.

Partoprenis dek studentoj de la Universitato pri Informadikaj Sciencoj, kaj unu instruisto, kiuj membras en la E-klubo.

La estraro de KEA estis reprezentata de Julián Hernández Angulo (prezidanto) kaj Albania Duthil, kaj ankaŭ ĉeestis Ljudmila Kaŝtanova.

Estis prezentitaj temoj rilataj al Esperanto, teoriaj bazoj, "Esperanto en Kubo", "Esperanto en la nuntempo", "Esperanto en informadiko", kaj al la perspektivoj kaj rolo de la klubanoj en la estonteco de la landa movado.

La studentino Yosleini Zulueta, de la 4a kurso, estis la venkinto en la konkurso "Kion vi scias pri Esperanto?", kiu estis lanĉita de la klubo por la tuta universitata komunumo.

RONALD BABY GONZÁLEZ

La Havana Kolombo flugis

De la 18a de februaro ĝis la 1a de marto Fráncel Briel (junularaj aferoj kaj propagando) kaj Bárbaro Lazcano (prezidanto), membroj de la E-klubo Havana Kolombo, restis en la urboj Santiago de Cuba kaj Contra-maestre, kun la celo interkonatigi kun la lokaj esperantistoj kaj prelegi pri la terapio Yumeiho.

Krome en la kampadejo La Hirundoj, en la koro mem de Sierra Maestra, okazis prezento de Esperanto pere de la loka radios-tacio voĉe de Bárbaro, Fráncel, kaj Bania Bernal (kasistino de la E-grupo en Contra-maestre).

Julio César Tamayo, Alberto Fong, Sandra Betancourt, kaj Bania kunorganizis la sukcesan eventon.

FRÁNCEL BRIEL

KEA en la lastaj jaroj

- * Tri KEA-kongresoj (1996, 1999 kaj 2002)
- * Stando en Internaciaj Librofoiroj Havano 1994-2003
- * Stando en la Internaciaj Librofoiroj de Santo Domingo (Dominika Respubliko) 2002-2003 kaj Guadalajara (Meksiko) 2003
- * Prelegoj kaj standoj en ĉiuj lingvofoiroj Expolingua
- * Naciaj Seminarioj por Instruantoj kaj/aŭ pri Informado (1994-2003)
- * Du simpozioj ĉe la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (1997 kaj 1999)
- * Naciaj Seminarioj por Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST, 1995, 1997, 2000 kaj 2006)
- * Partopreno de oficialaj Kubaj delegacioj al UK-oj (1994-2003)
- * Partopreno en tri Tulamerikaj Kongresoj de Esperanto (1996, 1999 kaj 2001)
- * Membriĝo en la Amerika Komisiono de UEA ekde ĝia kreado en 1994
- * Eldonado de kelkaj libroj (origine verkita en Esperanto aŭ tradukita)
- * 16-jara dimanĉa radioprogramo en Esperanto per Radio Havano-Kubo
- * Du tutlandaj infanfestivaloj (2000 kaj 2002)
- * Kuba Kultura E-Festivalo (1998)
- * Prezento de dekoj da ekspozicioj por la publiko en kulturklerigaj institucioj
- * Esperanto-legsalonoj en du provincaj bibliotekoj
- * Jaraj komitatkunsidoj 1994-2003
- * Centoj da intervjuoj kaj programoj per radio kaj televido
- * Okazigo de dekoj da tutlandaj, regionaj kaj provincaj renkontiĝoj
- * Aperigo de dekoj da artikoloj, informoj, ktp. en la gazetaro
- * Dekoj da prelegoj pri Esperanto en eksterasociaj institucioj
- * Dekoj da prelegoj pri eroj de nia E. agado en Ameriko, Eŭropo, Azio kaj Aŭstralio
- * Instruado de centoj da kursoj: regulaj, superaj, ekspresaj, radiaj, krom Koresponda Kurso
- * Partopreno en diversaj fakaj konferencoj eksterasociaj (pri tradukado, literaturo, lingvistiko...)
- * Aktivaj interrilatoj kun institucioj kulturklerigaj, edukaj, registaraj...

El: www.esiss.co.cu/esperanto/historio.htm

Grava informo por la legantoj:

Vi ricevas tiun ĉi numeron de *Avanco* kun peto de la redakcio: Ni disponas pri tre limigita eldonkvanto kaj atendas vian konfirmon pri ricevo por aktualigi vian nomon kaj adreson en nia dissendolisto. Profitu la ŝancon por esprimi vian opinion pri tiu ĉi kaj la lastaj numeroj kaj sendu kontribuon aŭ ideojn por publikigi. Bv. leteri al: **Norberto Díaz Guevara, Apartado 77, 60200 Sancti Spiritus**; aŭ retpoŝte: norberto@ssp.desoft.cu
Kun amikaj salutoj,
La redakcio

Pri Esperanto-kulturo en Kubo

Al la kuba E-kulturo kontribuis multaj esperantistoj kiuj verkis literaturaĵojn en esperanto nialande ekde la eniro de la Internacia Lingvo Esperanto en Kubo.

Post la fondiĝo de Kuba Esperanto Asocio, la 16an de junio 1979 la kuba E-kulturo kompreneble pli evoluis, ĉar KEA tre organizite kaj kun difinitaj celoj aranĝis planojn pri diversaj naciaj kaj internaciaj eventoj kiel kongresoj, seminarioj, festivaloj, artaj prezentoj ktp. kaj tiaj eventoj ebligis kontaktojn inter nia esperantistaro kaj ankaŭ inter kubaj kaj eksterlandaj esperantistoj, kio sendube riĉigis kaj evoluigis la E-kulturon nialande.

Kiam kubaj esperantistoj verkas eseon, poezion, kanzonon, romanon, aŭ redaktas artikolon aŭ radioprogramon en Esperanto, kiam ili esperantigas beletraĵojn, fakte kontribuas al la pliriĉigo de la kuba E-kulturo, kaj samtempe ankaŭ al la monda E-kulturo, ĉar kiel vi scias Esperanto havas inkluzivan kulturon. Por meti pli klarajn ekzemplojn: la Kuba Esperanto-kulturo plukreskis kiam nia Fremdlingva Eldonejo José Martí eldonis kelkajn gravajn kubajn verkojn en esperanto, kiam kubaj entreprenoj iam pretigis poŝtmarkojn, telefonkartojn, aŭ aliajn esperantaĵojn.

Ni, esperantistoj estas samtempe naciaĵoj kaj mondanoj. Ni esprimas nian mondanecan per la internacia lingvo Esperanto kaj nia naciecon per la gepatra lingvo. Tiuj, kiuj uzas Esperanton sur la kampo de la krea verkado aŭ sur la kampo de internacia kom-

preniĝo kaj amikeco antaŭenpuŝas la disvolvon de la kuba esperanta kulturo.

Nacian kaj tutmondan kulturbazon samtempe posedas ni, kaj nia esperanta kulturo estas sendependa de nia nacia kulturo.

La vivo de Kuba esperanto-kulturo troviĝas grandparte en niaj bultenoj kaj revuoj, pro tio ili devas aperi akurate kaj enhavi interesajn informojn por stimuli la legadon. Ili estas niaj ligiloj kaj informiloj, nerefuteblaj pruvoj de nia sindonemo, entuziasmo, kaj aktiveco ene de nia asocio; pro tio nun mi deziras kore danki la diversajn redaktorojn de nia oficiala organo *Avanco* pro la kvalito de la bulteno, ankaŭ tiujn esperantistojn kiuj kunlaboris verkante artikolojn por ĝi.

Ĉiuj scias, ke esperanto estas komunikilo interhoma, ke nuntempe danke al tekniko parvo povas komunikiĝi per Interreto, ke Esperanto estas tre populara en Interreto kaj ke retpoŝto ankaŭ faciligas al ĉiu klubo, aŭ filio de KEA la komunikiĝon kaj disvastigon de regiona kultura agado.

Pro tio ĉio, estraranoj de nia asocio devas instigi kaj stimuli la uzadon de komputiloj inter siaj membroj kaj la aranĝon de E-retpaĝoj, tiamaniere lokaj grupoj nialande povas kontakti aliajn landajn kaj eksterlandajn esperantistojn kaj interŝanĝi spertojn pri regionaj E-agadoj.

Alia neforgesebla grava tasko por ni ĉiuj estas la daŭra pluklerigado de niaj movadaj gvidantoj, portantoj de la kuba esperanto-kulturo.

MARTÍN CASTRO LÓPEZ

Plurjara poresperanta agado en Ameriko

La aŭtoro de tiu ĉi teksto, veturigas nin tra la historio de la movado en Ameriko, kaj prezentas al ni la naskiĝon de la Tutamerikaj Kongresoj

Meze de 1994, dum la UK en Seŭlo, naskiĝis la Amerika Komisiono de UEA por la disvastigo de la poresperanta agado en nia kontinento, kaj nur kelkajn monatojn poste, fine de tiu jaro, la tiatempa Nacia Estraro de KEA decidis ke mi membru tiun teamon, kiel reprezentanto de Kuba Esperanto-Asocio.

En tiuj unuaj momentoj, konsistigis la Komisionon delegitoj el Kanado, Usono, Meksikio, Nikaragvo, Kubo, Brazilo, Venezuelo kaj Argentino, kiuj – sub la gvido de s-ro Atilio Orellana –, individue kaj kolektive, entreprenis titanan laboragadon, de diversaj vidpunktoj kaj laŭ la eblaj rimedoj.

De tiam, mi memoras, ke nia agado marŝis ĉefe per regulaj leteraj kontaktoj inter la komisionanoj, kaj kun ĉiuj landaj, lokaj kaj fakaj asocioj; interŝanĝoj de E-gazetoj, kiel *Lumo* (Kanado), *ELNA-Newsletter* (Usono), *Avanco* (Kubo), *Venezuela Stelo* (Venezuelo), *Andaj Ondo* (Kolombio), *Brazila Esperantisto* (Brazilo), ktp.

Tiam, Esperanto en Centrameriko kaj la Kariba regiono nur estis vigla en Kubo, ekzistis kluboj en San José (Kostariko) kaj Managua (Nikaragvo) kaj izolitaj esperantistoj en Haitio kaj Gvatemalo.

La tutkontinenta laboro celis unue kunordigadi la enlandan agadon en rilato kun instruado al interesitoj, informado al esperantistoj kaj al la ĝenerala publiko, organizo de kulturaj aranĝoj, kolekto kaj interŝanĝo de instruaj tekstoj, ktp. Kaj, kompreneble, okazigi kongresojn de Esperanto, kiuj silentis de 1980, kiam en San Luis (Argentino) oni sukcese aranĝis la 2an regionan kongreson.

Post pluraj kontaktoj, oni decidis organizi la 3an Amerikan Kongreson en San José (Kostariko), de la 12a ĝis la 17a de februaro 1996, sub la temo "Esperanto kaj la rilatoj inter Nordo kaj Sudo".

Entute, partoprenis 50 personoj el 17 landoj, el kiuj 11 estis amerikanoj (unuafoje estis reprezentitaj Nikaragvo kaj Panamo).

La programo disvolviĝis je tri temoj: kunvido pri Amerika Agado, Instruado kaj Turismado. Speciala surprizo por ĉiuj estis, ke la plimulta hispanparolanta Ameriko uzis kiel instrumaterialon *¿Sabe Ud. Esperanto?* kaj la vortaron de la eldonejo Sopena, elĉerpita en pluraj landoj.

Konstatinte la problemojn, kiujn nia agado por Esperanto alfrontis en la kontinento, kaj kun la celo al plia kunordigado de la

laboro en la tuta Ameriko, la Kongreso rekomendis al la Amerikaj landaj asocioj:

1. *Nomi komisiiton pri Amerika Agado ene de ties estraro;*
2. *Daŭre kontribui, per artikoloj, al la informa revuo pri Ameriko, lanĉota aprile de 1996, en Interreto, sub respondecado de la Universitato de Kostariko*
3. *Pli efike diskonigi la ekziston de Fondaĵo Ameriko de UEA, kies nomo de tiam estu Latinamerika Fondaĵo;*
4. *Subteni la fondaĵon finance, kaj proponi projektojn celantajn la diskonigon de E en la kontinento.*
5. *Daŭrigi la serion de kontinentaj aranĝoj, kun trijara periodeco, sub la nomo Tutamerika Kongreso, por eviti miskomprenojn;*
6. *Ke la kongresoj alternu inter norda, meza kaj suda Ameriko;*
7. *Instigo al latinamerikaj landoj interŝanĝi ties oficialajn organojn;*
8. *Starigi amerikan revuon por diskonigi informojn pri nia agado, kaj*
9. *Okazigi la 4an Tutamerikan Kongreson en Bogoto (Kolombio) en 1999.*

Krome, la personaj kontaktoj de pluraj membroj de la Amerika Komisiono kaj homoj el Argentino, Brazilo, Kanado, Kolombio, Kostariko, Kubo, Meksikio, Nikaragvo, Panamo, Usono, Venezuelo kaj kelkaj eŭropaj landoj, permesis plifortigi la interrilatojn por la sekva periodo, survoje al Bogoto.

De tiu periodo venas la starigo de Amerika Budo dum Universalaj Kongresoj, kio sendube ampleksigis la diskonigon de informoj pri la multflanka agado por Esperanto en nia kontinento, kaj plifortigis la laboron de la komisionoj tiucele.

Tiam, naskiĝis la bulteno *AktivAmeriko*, kiu dum pluraj jaroj redaktis Atilio Orellana kun la helpo de pluraj kunlaborantoj. Per tiu

gazeto, oni diskonigis centojn da informoj pri Esperanto en Ameriko. Tiam, ankaŭ, naskiĝis la ebleco elekti homojn el nepagipovaj landoj, ĉefe junuloj, por partoprenigi ilin en diversaj eventoj, pere de la Fondaĵo Ameriko kaj de aliaj rimedoj.

Rezulto de tiu multflanka agado estis la sukcesa okazigo de la 4a Tutamerika Kongreso, en Bogoto (Kolombio), de la 27a de januaro ĝis la 3a de februaro 1999, sub la temo "Esperanto kaj la tria jarmilo". Tie partoprenis 76 homoj el 12 landoj; inter ili, la komisionanoj el Brazilo, Kolombio, Kubo, Meksikio, Usono kaj Venezuelo, kiuj interŝanĝis spertojn kaj ideojn pri diversaj aferoj.

La rezultoj de tiu kongreso iris ĉefe en du direktojn:

– **Interne:** Interligi la ankoraŭ disajn aktivulojn en nia kontinento, cele al la starigado kaj daŭra plifortigo de la Tutamerika E-Movado per diversaj rimedoj; ne plu demandi al UEA kion ĝi faros por ni, sed kion ni mem faru en la kolosa tasko disvastigi nian lingvon tra la tri Amerikoj; norda, meza kaj suda; kaj krei oficejon por la Amerika agado.

– **Ekstere:** Rekomendi al edukaj instancoj partoprenadon en la tutmonda lerneja programo Interkulturo, de ILEI kaj Unesko; esplori diversajn eblecojn diplomati E-instruistojn, jam diplomigintaj pri ĝenerala lingvoinstruado, por faciligi la enkondukon de Esperanto kiel studobjekton en lernejoj; kaj eltiri maksimuman profiton el la tutmonda interkomunika reto cele al sukcesigo de niaj kongresoj kaj de nia komuna celo tutmondigi Esperanton.

Kvankam tiuj grandaj celoj ne konkretiĝis per precizaj ideoj aŭ planoj, post tiu momento, nia intensa laboragado favora al disvastigo de Esperanto en Ameriko daŭris per leteraj kontaktoj, informoj, gazetinterŝanĝoj, ĉefe danke al la aktiva, serioza kaj senĉesa agado de Atilio je diversaj branĉoj, kiu en tiuj jaroj estis gran-

da motoro por la evoluo de la Internacia Lingvo en la kontinento. Tio ankaŭ ege fruktodonis kaj la Internacia Lingvo etendiĝis al aliaj landoj de la kontinento, foje per izolitaj esperantistoj, foje per kluboj, sed iamaniere la afero bone marŝis.

Pinta kaj preskaŭ fina momento de la agemo de Atilio kiel komisiito de UEA pri Ameriko estis la okazigo de la 5a Tutamerika Kongreso en Meksikurbo, de la 15a ĝis la 21a de aprilo 2001, kies temo estis "Ameriko: Unu kontinento, diversaj historioj".

En tiu inda kongreso renkontiĝis pli ol cento da homoj el 22 landoj; inter ili, 12 el Ameriko: Argentino, Brazilo, Honduraso, Kanado, Kolombio, Kostariko, Kubo, Meksikio, Nikarakvo, Usono kaj Venezuelo, kvankam entute aliĝis 160 personoj el 29 landoj.

Rilate al tiu sukcesa okazintaĵo, Alberto García Fumero, en *Avanco* 2/2001, diras ke, fakte, oni trompis lin, ĉar ne temis "(...) pri Tutamerika Kongreso, sed pri Universala Kongreso. Alvenis homoj el ĉiuj mondpartoj: eĉ el Nepalo..."

Krom tio, partoprenis pluraj eminentuloj. Inter ili Mark Fettes, Michela Lipari (tiam Ĝenerala Sekretario de UEA), Atilio Orellana, Vladka Chvatalova (reprezentantino de TEJO), Gilbert kaj Sýmiide Ledon, Izaó Carneiro, Detlev Meier, Bill Maxey, Lucille Harmon kaj aliaj, kiuj ankaŭ prelegis kaj multe pliriĉigis la ampleksan enhavon de la Kongreso.

Sed ne nur festprelegoj kaj pluraj kulturaj kaj distraĵaj aranĝoj riĉigis la Kongreson. Menciindas, ankaŭ, ke unufoje en tiutipaj eventoj estis pluraj kunsidoj rilataj al la Esperanto-movado en Ameriko: ni ĉiuj havis la ŝancon preparoli, diskuti, analizi kaj komenti pri informado, instruado, apliko de Esperanto, junularo, financoj kaj strategiaj planoj.

Rezulte de tiuj diskutoj, oni decidis prezenti du kongresajn rezoluciojn, kiujn ni inkludas ĉi tie, ĉar temas pri gravaj dokumentoj por la estonteco de Esperanto en la kontinento.

La Kongresa Rezolucio 1 (por diskonigo precipe inter e-istoj) tekstas:

Ni, Esperantistoj el 29 landoj de Ameriko kaj de aliaj mondopartoj, aŭdinte raportojn pri la stato de la Esperanto-Movado en Ameriko kaj pridiskutinte ideojn por ĝia progresigo,

konstatas

- *ke ekzistas kreskanta intereso pri regiona kunlaboro en Ameriko;*
- *ke, malgraŭ tio, malmultaj aktivuloj aŭ asocioj bone konas la Movadon en aliaj landoj;*
- *ke pli bona reciproka kono kaj kunlaboro povus multe helpi ne nur pri la disvastigo de Esperanto, sed ankaŭ pri ĝia uzado por interkulturaj celoj;*

kaj sekve rekomendas

- *ke la plej fortaj landaj asocioj de la regiono, en Brazilo, Kubo kaj Usono, dediĉu parton de sia agad-programo al plifortigo de la regiona kunlaboro;*
- *ke oni konsideru interalie: (1) la regulan interŝanĝadon de informoj kaj ideoj per Interreto kaj diskutliste kaj TTT-paĝe; (2) la plivastigon de Brazila Esperantisto al tutkontinenta revuo; (3) la gastigadon de aktivuloj el aliaj landaj movadoj; (4) la organizadon de trejnseminarioj pri informado, instruado kaj aplikado de Esperanto.*
- *ke ĉiuj landaj asocioj provu kunordigi sian agadprogramon kun la laborplano de la UEA-Komisiono por Ameriko 2001-2010;*

- ke ĉiuj Landaj Asocioj kunlaboru pli aktive kaj celkonscie en la Komitato de UEA, interalie per reciproka konsultado de la amerikaj komitatanoj kaj per la subteno kaj antaŭenigo de proponoj por reformi la strukturon kaj tagordon de la komitatkunsidoj, por ke tiuj pli bone respondu al la intereso kaj prioritatoj de la regiona kaj landa agado.

Aliflanke, la Kongresa Rezolucio 2 (tradukota nacilingve, por diskonigo precipe al ekstermovada publiko) diras ke:

En ĉi tiu semajno, kiam reprezentantoj de la ŝtatoj el la tuta Ameriko preparos la komercan unuiĝon de la kontinento, ni, parolantoj de Esperanto el ĉiuj regionoj de Ameriko kaj el aliaj mondopartoj, alvokas por alia unuiĝo:

- unuiĝo sur bazo de komunika egaleco, kiu respektas la naciajn kaj etnajn diferencojn kaj inter kaj ene de la ŝtatoj;
- unuiĝo sur bazo de transnacia edukado, kiu konigas al infanoj diversajn vidpunktojn pri la historio kaj instigas ilin al senpera konatiĝo kun aliaj kulturoj;
- unuiĝo sur bazo de lingva kaj kultura diverseco, kun aparta atento al la protektado kaj disvolvado de la indiĝenaj kulturoj.

Tia Ameriko eblas kaj indas. Ni invitas ĉujn homojn aliĝi al ni por ĝia konstruado.

La ĉeestantoj aprobis ambaŭ dokumentojn en Meksikurbo la 21an de aprilo 2001.

Bedaŭrinde, kiam oni trarigardas la rezoluciojn de niaj 2a, 3a, 4a kaj 5a kongresoj (ne gravas se estis nomataj Latinamerika, Amerika aŭ Tutamerika), facile videblas ke niaj revoj ankoraŭ restas nur surpapere, kaj la vera plenumo de tiuj ideoj multfoje atendas je ni ĉiuj, ĉefe la membroj de la Ame-

rika Komisiono, sed ankaŭ de la landaj kaj lokaj asocioj, kluboj, elstaruloj kaj individuaj aktivuloj kiuj vere amegas tiujn ideojn.

Aldonendas al tio la malbona funkciado de la Komisiono en la lastaj jaroj, ĉefe pro la fakto, ke oni iom perdis la laborsistemon de Atilio kaj la agado iris en aliajn direktojn, kio rezultigis mankon de kunordigo, interŝanĝoj, interrilatoj, informoj kaj instigo al la laboro.

La plej granda pruvo de tio montriĝis dum la 6a Tutamerika Kongreso, de la 21a ĝis la 27a de marto 2004 en Havano, al kiu aliĝis entute 186 personoj el 19 landoj; sed, pro diversaj kialoj, nur partoprenis du membroj de la Amerika Komisiono (Richard Piper, el Kanado; kaj mi), dum la Kongreson ĉeestis reprezentantoj el 6 amerikaj landoj: Kanado, Kostariko, Kubo, Meksiko, Usono kaj Brazilo.

Tamen, la Kongreso sukcesis el diversaj vidpunktoj, kaj la ĉeestantaj amerikanoj funde analizis la nuntempan situacion de Esperanto en la kontinento kaj, fine, rezoluciis prenante en konsideron tiktajn bezonojn por la reala kaj efika poresperanta agado en tiu ĉi mondoparto.

Do, la Kongresa Rezolucio esprimis tiujn sentojn jene:

Ni, esperantistoj el ses amerikaj landoj (Kanado, Usono, Kubo, Meksiko, Kostariko kaj Brazilo), analizinte la nuntempan situacion de la Amerika Movado kaj pridiskutinte ideojn por ĝia progresigo,

Konstatas

- ke nur ĉeestis la kongreson du membroj de la Amerika Komisiono kaj pro tio oni ne sukcesis okazigi kunsidon de la Komisiono;
- ke ne estis prezentitaj projektoj nek raportoj fare de la Komisiono;

- ke neniu el la ĉeestantaj landoj konas – kaze ke tiaj ekzistas – regularon kaj statuton por la Amerika Komisiono;
- ke ni bezonas difini respondecojn kaj labormetodojn por tiu ĉi komisiono, same kiel pri la uzo de la rimedoj de la Fondaĵo Ameriko;
- ke mankas nuntempe integriĝa kunordigado de la kontinenta laboro;
- ke la neoficiala kandidata lando por okazigi la 7an TAKE en Sudameriko, Ĉilio, nek sendis reprezentanton por transpreni tiun respondecon nek klarigis pri sia malĉeesto, kaj
- ke Kanado – ĉeestanta lando – proponis sin por alpreni tiun taskon.

Ni rekomendas

- ke la Estraro de UEA devontigu siajn komisiestrojn, se ne ĉeesti, reprezentiĝi almenaŭ per raporto en la koncernaj kongresoj;
 - la redaktadon de regularo de la Komisiono kiu devas nepre inkluzivi difinojn pri esencaj aspektoj de ĝia laboro, inter alie:
 - a) respondecoj kaj labormetodoj de la komisionanoj kaj komisiestro
 - b) uzo de la rimedoj de Amerika Fondaĵo
 - c) rolo de la Amerika Oficejo;
 - ke la komisiestro kaj komisionanoj regule informu unu la alian pri sia agado;
 - ke oni konsideru kaj pristudu la eblecon krei tutkontinentan gazeton kulturan kaj socimovadan;
 - ke la Komisiono laboru cele al la plenumado de la laborplano 2001-2010 aprobita en Meksiko dum la 5a TAKE;
 - ke oni kreu la bezonatajn kondiĉojn por okazigi la 7an TAKE en Calgary (Kanado) en majo 2007, laŭ decido de la ĉeestantaj Amerikaj landoj, kaj subtenata de Kanada Esperanto-Asocio; kaj
- ke oni konsideru la eblecon efektiviĝi la 8an TAKE en Ĉilio, en la jaro 2010.

Disvastigo en Karibio kaj Centrameriko

Krom Kubo, dum pluraj jaroj, la ekzisto de Esperanto en Centrameriko kaj la Kariba areo limiĝis al izolitaj esperantistoj kaj kluboj, ĉefe en Kostariko kaj Nikaragvo.

Nur la intensa agado de la Komisiono Ameriko, sub la gvido de Atilio Orellana, permesis etendigi la Internacian Lingvon al aliaj amerikaj landoj, kiel Panamo, Honduro, Salvadoro kaj Dominika Respubliko.

Ene de tiu aktivado estiĝis ankaŭ nia ideo disvastigi Esperanton en la Kariba regiono.

Rezulto de tio estis nia Projekto Karibio, prezentita al la Kuba Unesko-Komisiono meze de la jaro 1999. Jen la teksto de tiu projekto:

- *Konscia pri tio, ke la nivelo je disvolvo atingita de la moderna mondo postulas ĉiam pli konstantan kaj kreskantan internacian interŝanĝon;*
- *Konvinkita, ke tia disvolvo akcele antaŭeniras al tutmondiga procezo je neantaŭvideblaj rezultoj;*
- *Informita pri la procezoj je regiona integriĝo (Eŭropa Unuiĝo, Asocio de Karibaj Ŝtatoj, ...), kiuj instigas ĉiuf flankan alproksimiĝon;*
- *Prenante en konsideron la barilon por la plena integriĝo, kiun konsistigas la lingvo-diverseco, ne nur je ŝtata aŭ registra nivelo, sed ankaŭ por unuopulaj kontaktoj;*

Kuba Esperanto-Asocio
Proponas:

Favorigi, instigi kaj disvolvi la uzadon de E en la Kariba areo, prenante kiel start-punktojn:

- *La nunan integriĝan procezon en la regiono;*
- *La lingvan diversecon en ĝi ekzistanta (lingvoj hispana, angla, franca, kreola, nederlanda...);*
- *La stabilecon atingitan de Esperanto dum pli ol jarcento de praktika uzado; kaj*
- *la du Unesko-rezoluciojn favore al la Internacia Lingvo.*

Konkretaj ideoj cele al la atingo de tiu kultura interŝanĝo:

1. *Esplori ĉe karibaj kulturaj institucioj la disvastigon de informoj pri Esperanto.*
2. *Esplori kun tiuj institucioj la instruadon de Esperanto per instruistoj el nia Asocio.*
3. *Fari demarŝojn por la eventuala reeldono de Kariba Stelo, eldonaĵo asocia dum la 80aj jaroj. Ĝi povus aperi en pli ol unu lingvo (hispana, angla, kreola, nederlanda, ... kaj Esperanto, laŭaŭspicie.*
4. *Same agadi rilate al Latinamerika Esperantisto, eldonita en Kubo dum la jaroj 1912-1917.*
5. *Instigi la interŝanĝon inter esperantistoj el diversaj landoj kaj esplori ilian partoprenon en la Festivalo de Karibaj Artoj, ĉiujare okazanta en Santiago de Kubo.*

Ni kalkulas je apogo kaj helpo de jenaj E-institucioj:

- *Subteno flanke de la Komisiono Ameriko de Universala Esperanto-Asocio.*
- *Subteno flanke de la asocioj en landoj de Norda, Centra kaj Suda Ameriko.*
- *Subteno flanke de Esperanto-institucioj el aliaj regionoj.*

Pluraj instancoj de UEA interesiĝis pri tio kaj pri la eblo puŝi la projekton pere de diversaj rimedoj; sed, bedaŭrinde, la ideo ne ricevis la bezonatan apogon de la Kuba Unesko-Komisiono kaj tiam perdiĝis bela eblo tiucele. Tamen, lastatempe, la situacio en rilato kun la intereso por la evoluigo de la poresperanta agado en Ameriko (speciale Centrameriko-Karibio) tute ŝanĝiĝis, ĉar UEA multe interesiĝas pri tio kaj instigas nin rearanĝi la aferon, tenante en konsideron, ke Unesko akceptis envicigi la projekton "Esperanto por daŭrigebla evoluo" en la kadron de la Jardeko de Kulturo de Paco 2001-2010.

UEA pretas, ankaŭ, atesti ĉe la Kuba Unesko-Komisiono, ke Universala Esperanto-Asocio estas partnero de Unesko en tiu projekto, kie KEA povus ludi kiel aganto, pere de eksperimento farota – sub scienca kontrolo – pri la lernorezultoj de Esperanto kompare kun aliaj fremdaj lingvoj.

Do, tuj post la 5a KEA-Kongreso, ni reprenos kontaktojn kun la Kuba Unesko-Komisiono kaj ekkomencos ilin kun la Regiona Oficejo de Unesko pri Kulturo – kies sidejo estas en Havano – por aliffoje prezenti nian projekton pri la Kariba regiono, nun en alia metodologia formo, laŭ la sugestoj de fakuloj.

Sur tiu tereno, validas pluraj ideoj aperantaj en nia projekto, ĉefe en la direkto informado al la ĝenerala publiko, kiu multfoje konas nenion pri Esperanto aŭ simple pensas, ke tiu lingvo delonge mortis. Tion ni jam spertis plurfoje per partopreno en la internaciaj librofoiroj de Santo Domingo (Dominika Respubliko), en 2002 kaj 2003 kaj Guadalajara (Meksikio), en 2002, eventoj kiujn ni ne rajtas forgesi, ĉar temas pri grandaj tribunoj, kie partoprenas miloj da homoj kaj eblas rekte disdoni informilojn kaj paroli pri Esperanto. Por malfermi pordojn en tiun direkton, mi konsideras ke, inter aliaj afe-

roj, oni bezonas starigi rilatojn kun kulturklerigaj institucioj kaj amaskomunikiloj en la Kariba regiono kaj Centrameriko, kaj havi homajn fortojn por funde kaj amplekse informadi la eksteran publikon – uzante ĉiujn ekzistantajn rimedojn – pri Esperanto, eĉ el lingvistika vidpunkto, sed ankaŭ havi homajn fortokapablojn instrui la Internacian Lingvon ne nur en aliaj landoj, sed ankaŭ pere de Interreto. Ne hazarde, de antaŭ pluraj jaroj, KEA decidis, ke sia unua prioritato estas informado, interne kaj ekstermovade. Same opinias la Amerika Komisiono, laŭ la Laborplano 2001-2010; sed tio estas prioritato ankaŭ de UEA.

Konkludoj

Milojn da kromaj vortoj mi povus aldoni, esprimi ideojn, proponi eblojn, sed vortoj simple restas vortoj kaj ne nur tion ni bezonas.

Antaŭ ni staras grandaj defioj kaj grandaj taskoj, kaj ene de miaj agadkampoj, ne nur kiel membro de la Amerika Komisiono, sed ankaŭ kiel estrarano pri Informado kaj Eksteraj Rilatoj, kaj respondeculo ĉe KEA pri ĉio rilata al Unesko.

Do, grava parto de la tuja estonteco de KEA estas la evoluigo de Esperanto en Centrameriko kaj la Kariba regiono kaj tio postulas el ni diversajn aferojn samtempajn: konkretajn planojn, seriozan agadon, realan disvastigon, efikan informadon, informilojn, prelegojn kaj ekspoziciojn, sendadon de libroj, revuoj, broŝuroj kaj alispecaj materialoj al amaskomunikiloj, universitatoj, kolegioj, bibliotekoj, multfoje eĉ per Interreto, por ke pli da homoj informiĝu pri Esperanto. Tiuj aferoj estas parto de niaj ĉefaj agadlinioj. Ankaŭ enlande. Antaŭen, al la laboro!

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

1a Latinamerika Kongreso

1978 (17a-22a de julio), Marília (Brazilo). Partoprenis ĉ. 500 kongresanoj el 12 latinamerikaj landoj.

2a Latinamerika Kongreso

1980, San Luis (Argentino)

3a Amerika Kongreso

1996 (12a-17a de februaro), San José (Kostariko). Temo: "Esperanto kaj la rilatoj inter nordo kaj sudo". Partoprenis 50 kongresanoj el 17 landoj el kiuj 11 amerikaj: Argentino, Brazilo, Kanado, Kolombio, Kostariko, Kubo, Meksiko, Nikaragvo, Panamo, Usono kaj Venezuelo.

4a Tutamerika Kongreso

1999 (27a de januaro-3a de februaro), Bogotá (Kolombio). Temo: "Esperanto kaj la tria jarmilo". Partoprenis 76 kongresanoj el 12 landoj, el kiuj 7 amerikaj: Brazilo, Kolombio, Kubo, Meksiko, Urugvajo, Usono kaj Venezuelo.

5a Tutamerika Kongreso

2001 (15a-21a de aprilo), Ciudad de México (Meksiko). Temo: "Ameriko: Unu kontinento, diversaj historioj". Partoprenis pli ol 100 kongresanoj el 22 landoj el kiuj 11 amerikaj: Argentino, Brazilo, Honduraso, Kanado, Kolombio, Kostariko, Kubo, Meksiko, Nikaragvo, Usono kaj Venezuelo, sed entute aliĝis 160 kongresanoj el 29 landoj.

6a Tutamerika Kongreso

2004 (21a-27a de marto), La Habana (Kubo). Temo: "Ĉia E-movado por Ameriko?". Partoprenis 186 kongresanoj el 17 landoj el kiuj 6 amerikaj: Brazilo, Kanado, Kostariko, Kubo, Meksiko kaj Usono, sed aliĝis homoj el 29 landoj.



AVANCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo

Telefono: +53(7)10 4484; Fakso: 649 8729

avanco@esperanto.co.cu

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro